

La Universalaj Kongresoj kaj la kreo de Esperanto-komunumo: hieraŭ, hodiaŭ, morgaŭ

Humphrey Tonkin

1. La ekesto de la Esperanto-komunumo

La unua Universala Kongreso de Esperanto okazis en la franca urbo Bulonjo-sur-Marco en la eŭropa somero de 1905, antaŭ ĝuste cent jaroj. Je tiu stadio, Esperanto jam ekzistis en publikigita formo dek ok jarojn, kaj la Esperanto-movado mem estis preskaŭ tiel aĝa. Zamenhof, la kreinto (aŭ, kiel li preferis nomiĝi, la iniciatinto) de la lingvo, laboris de la komenco por krei aŭtentikan movadon de uzantoj, kaj en la daŭro de la 1890aj jaroj li ripete montris sin preta adaptiĝi al la deziroj kaj bezonoj de tiuj unuaj adeptoj. En tio li montris grandan kontraston al Johann Martin Schleyer, la aŭtoro, kelkajn jarojn pli frue, de Volapük, kiu tenis firman manon super sia kreaĵo.

La unuaj lernantoj de Esperanto lernis ĝin ĉefe el la libreto, kiun Zamenhof eldonis en 1887 kun la helpo de sia edzino Klara Zilbernik. Por tiuj unuaj adeptoj la lingvo estis do unuavice legata kaj skribata lingvo, lingvo de tekstoj. Ni scias, ke en tre frua stadio okazis konversacioj en Esperanto inter Zamenhof kaj aliaj (la pola poeto kaj Esperanto-pioniro Antoni Grabowski pretendis, ke li estis la unua, kiu havis tian konversacion), sed ne estus erare noti, ke Esperanto, malsimile al la etnaj lingvoj, kiuj estis unue parolaj lingvoj, estis komence skriba kaj poste parola lingvo, aŭ almenaŭ ambaŭ samtempe (ĝi nepre ne estis unuavice parola). Ĉe Volapuko, tiu situacio estis verŝajne eĉ pli rimarkebla: tiam kiam Volapuko komencis fari transiron de skriba al parola lingvo, ĝi ŝajne montriĝis malfacile parolebla. Oni eĉ asertas, ke ĝuste la lanĉo de internaciaj volapukaj kongresoj ne tiel mallonge post la unua publikigo montris la limigitan aplikeblon de la lingvo kiel parola komunikilo.

Estas iom surprize, ke la esperantistoj atendis dek ok jarojn por okazigi sian unuan aŭtentike internacian renkontiĝon. En la unuaj jaroj de Esperanto, kiam formiĝis kun fulma rapideco lokaj Esperanto-kluboj unue en orienta kaj meza Eŭropo kaj poste (apud la fino de la jarcento) en okcidenta, la klubaj kunvenoj evidente uzis Esperanton kiel parolan komunikilon (ĝi montriĝis konsiderinde pli efika en tiu rilato ol Volapuko en la iamaj volapukaj kluboj), sed ĉefe temis pri samlingvanoj, kiuj ekzercis inter si sian lingvokonon: la internacia komunikado en Esperanto restis ĉefe skriba. Tiu skriba interkontaktado estis intensa: Esperanto fariĝis lingvo de korespondado, kaj miloj da leteroj interŝanĝiĝis, novaj internaciaj amikecoj estis formitaj, kaj tiumaniere la bazo de internacia reto de esperantistoj estis kreita. (Cetere, oni povas nur bedaŭri, ke tiuj fruaj korespondaĵoj, kiuj estus tiel interesaj por historiistoj kaj lingvistoj, plejparte perdiĝis.) Izoluloj komencis vojaĝi kaj tiel uzi parolan Esperanton en internacia medio (ekzemple Valdemar Langlet faris preskaŭ epopeajn vojaĝojn en la Rusa Imperio), sed temis pri

malmulta tia senpera internacia kontakto. Povus esti, ke ĝuste tiu longa tempodaŭro antaŭ la unua internacia renkontiĝo efikis kiel maturejo por la parola lingvo: ĝuste la fakto, ke homoj havis tempon por alkutimiĝi al la lingvo, certigis la sukceson de la eksperimento en 1905.

La unuaj dokumentitaj spuroj de internaciaj renkontiĝoj ĉiuj datiĝas de la unuaj jaroj de la dudeka jarcento. Jam okazis unu-du renkontiĝoj inter britoj kaj francoj trans la Markolo antaŭ 1905 (en Kalezo la 7-an de aŭgusto 1904 ĉeestis 180 britoj kaj francoj kun po unu homo el Belgio, Germanio kaj Ĉeĥio – tie ekĝermis la ideo pri vera esperantista kongreso¹), kaj en Italio oni pretendas identigi la unuan internacian renkontiĝon de esperantistoj, sed ĉiuj tiuj pretendoj estas esence malgrandskalaj kompare kun la aranĝo, kiu okazis en Bulonjo – laŭ iniciato, cetere, de Michaux, kiu faris la inviton en Kalezo. La aranĝon oni nomis “universala” kongreso laŭ la terminoj de tiu epoko: “universala” estis tiam la plej ofta adjektivo por priskribi tutmondecon: oni havis sian Universalan Poŝtan Union, fonditan en la deknaŭa jarcento kiel la unuan grandan interregistaran fakan organizaĵon, siajn Universalajn Ekspoziciojn, kaj kompreneble en 1908 sian Universalan Esperanto-Asocion. Sendube multaj aktivuloj de tiu epoko antaŭvidis, ke la Universalaj Kongresoj estos la unua paŝo al tutmonda organiziĝo de la esperantistoj. Efektive, jam antaŭ tiu ĉi unua kongreso Zamenhof proponis starigon de Tutmonda Ligo Esperantista, kvankam sen multa sukceso, interalie pro kvereloj inter la francaj Esperanto-gvidantoj, unu el kiuj, la konata De Beaufront, eĉ ne aperis en Bulonjo (pro “grava malsano,” kvankam verŝajne la koncerna malsano estis pli diplomatia ol bakteria). Beaufront, suspektema pri la motivoj kaj de siaj kolegoj kaj de Zamenhof mem, asertis, ke tiu Bulonja aranĝo ne povus fari decidojn, sed nur fari rekomendojn, ĉar ĝi ne konsistas el aŭtentikaj delegitoj.²

* * * * *

Ni notu tamen, jam en la komenco, ke la grava rolo ludata de tiuj ĉiujaraj aranĝoj (ĉar nun, cent jarojn poste, ni povas retrorigardi al preskaŭ seninterrompa fadeno de ĉiujaraj kongresoj) estas esence elita. Kvankam la fervojoj kaj modernaj vaporŝipoj faciligis la kontakton inter la nacioj, precipe en Eŭropo, tamen vojaĝi ne estis malmultekoste, kaj multaj tiuj personoj, kiuj kaptis la mesaĝon de Zamenhof en iu fora angulo de la Rusa Imperio, aŭ eĉ en kampara regiono de Francio, ne povis eĉ revii pri iama partopreno en Universalaj Kongresoj. Sekve la evoluo de la organizaj strukturoj de la Esperanto-movado, kaj ankaŭ la lingva evoluo, estis fenomeno de relative malgranda nombro de homoj, kiuj faris sian laboron nome de multe pli granda komunumo de homoj esence izolitaj. Iam oni nomis Esperanton diaspora lingvo – termino pravigebla je du kontraŭdiraj niveloj: unue, plene diaspora lingvo estas lingvo sen geografia centro, kaj certe Esperanto estas kaj ĉiam estis tia, en la senco, ke neniam ekzistis Esperantujo, el kiu homoj estis forpuŝataj aŭ

¹ La postan tagon la grupo iris al Dovro. Vidu L. Courtinat, *Historio de Esperanto*, vol 1: 1887-1913 (Bellerive-sur-Allier: La aŭtoro, 1964), 181-182. Pli frue, je pentekosto 1904, 12 britaj esperantistoj vojaĝis al Bulonjo, kie ili estis akceptitaj de la loka klubo (*The Esperantist* 1 [1904]: 136-138). La semajnfino de la 31-a de julio, 1904, grupo da britaj esperantistoj iris al Havro por kunveni kun membroj de la tiea Esperanto-klubo (*The Esperantist* 1 [1904]: 164-165).

² Marjorie Boulton, *Zamenhof, aŭtoro de Esperanto* (La Laguna: Régulo, 1962)

elmigris; due, diaspora lingvo estas lingvo, kiu komence havis sian geografian centron sed poste, pro migrado, disvastiĝis tiel ke la centro fariĝis malpli forta.

Fakte, oni povas aldoni, ke ĉe etnaj lingvoj ne migras la lingvo sed la homoj: parolantoj de difinita lingvo migradas, kaj ili portas kun si sian lingvon; dum ĉe Esperanto migras ĉefe la ideo, do la lingvo mem, pli ol la homoj.

Ekzistas tiuj, kiuj argumentus, ke, sendepende de tio ĉu jes aŭ ne Esperanto estas eŭropa lingvo laŭ siaj lingvaj karakterizaĵoj, ĝi ja estas *socie* eŭropdevena: la granda plimulto de esperantistoj en la fruaj jaroj estis eŭropaj, kaj ankoraŭ hodiaŭ la eŭropa socia influo je la Esperanto-movado (kaj sekve ĝia semantika influo – ĉar semantiko estas tiu tereno kie lingvaj strukturoj tuŝas sociajn strukturojn) estas ŝlosila. En la senco, ke Esperanto komenciĝis en Eŭropo kaj nun enradikiĝis en multaj aliaj mondopartoj (esence en ĉiuj mondopartoj), oni ja povus nomi ĝin diaspora. La Universalaj Kongresoj, en la komenco kaj same nun, estis do samtempe inkluziviloj (ili arigis homojn el foraj lokoj) kaj ekskluziviloj (ili arigis nur tiujn homojn, kiuj kapablis pagi la vojaĝon, ĉefe eŭropanojn). Kiel unu elemento en la evoluo de la Esperanto-movado, ili do funkciis kiel eŭropcentraj reguligiloj de la lingvo.

Se oni esceptas la du fruajn kongresojn en Usono – tiun de Vaŝingtono en 1910 kaj tiun de Sanfrancisko en 1915 (kiu estis nepre samtempe la plej malgranda: ĝi arigis nur 163 homojn), la unua ekstereŭropa Universala Kongreso estis tiu de Tokio en 1965, la kvindeka en la serio. Depost tiam, la ritmo plirapidiĝis: Portland, Usono, en 1972 (la kongreso planata por Telavivo en 1967 devis translokiĝi al Nederlando pro milito), Brazilio en 1981, Vankuvero en 1984, Pekino en 1986, Havano en 1990, Seulo en 1994, Adelajdo en 1997, Telavivo en 2000, Fortalezo en 2002, Pekino en 2004, kaj venos Jokohamo en 2007. Do, en la centjara historio de la Universalaj Kongresoj, de 1905 ĝis 1955 okazis du kongresoj ekster Eŭropo (tiuj en Usono) kaj de 1956 ĝis hodiaŭ okazis dekunu – por ne paroli pri foraj anguloj de Eŭropo kiel Sofio, Varno kaj Rejkjaviko. Evidente la nova elemento estas la evoluo de aertransporto, plus, en lastaj jaroj, la falo de ties prezo kaj la relativa faciligo de pasportaj kaj vizaj aranĝoj. Tamen, ni notu, ke en la unuaj kvindek jaroj, krom ekskursoj trifoje al la regiono de Pollando kaj Finnlando, kaj unufoje al Hungario, Ĉeĥoslovakio kaj Jugoslavio, la UK restis firme en la landoj de okcidenta Eŭropo. Kvankam la organiza rolo de la Universalaj Kongresoj ŝanĝiĝis tra la jaroj (ili ne ĉiam estis ligitaj al la dommastrumo de la ĉefaj internaciaj Esperanto-organizaĵoj), tamen la ĉefa faktoro en la geografia lokigo de Universalaj Kongresoj estis verŝajne la kapablo de la gvidantoj de la plej fortaj Esperanto-movadoj atingi la kongresan urbon. Tio ne ŝanĝiĝis hodiaŭ, sed ŝanĝiĝis la mondo.

La homoj, kiuj kolektiĝis en Bulonjo antaŭ cent jaroj estis do kombino de novaj entuziasmoj kaj pli veteranaj gvidantoj de la nova movado, precipe homoj el la burĝa kaj profesia klasoj en Francio kaj najbaraj landoj, sed ili ne estis en si mem plene reprezentaj de la diverseco de la esperantistoj. Venis malpli multaj homoj el la naskiĝlando de Zamenhof kaj el orienta Eŭropo ĝenerale. Kiel ni bone scias, la Deklaracio de Bulonjo pri la Esperantismo respegulis klopodon fare de Zamenhof mem trovi mezan vojon inter la ideologoj el oriento (inkluzive de Zamenhof kaj de multaj

mezaj esperantistoj okcidentaj) kaj la raciuloj el okcidento. La francoj ja volis meti definitivan finon al periodo de Esperanto, kiu ŝajnis al ili nescienca, amatoreca, kaj odora je la simplisma aliro al mondaj problemoj, kiun tiuj ĉi idoj de la civilizo emis malakcepti. Ni ne forgesu, ke Esperanto havas sian originon en la Lingvo Internacia de Doktoro Esperanto – kvazaŭ tiu lingvo (en periodo kiam, en la infanaj jaroj de la reklama arto, tujaj kuraciloj estis aparte popularaj) estus nova speco de hepata pilolo aŭ kontraŭdispepsia pulvoro aŭ sistemo por plibonigi la memorkapablon. Laŭ la francaj gvidantoj, necesis iel poluri la publikan bildon de Zamenhof por emfazi lian doktorecon kaj malemfazi lian revadon pri unuecigo de la lingvoj, religioj, kaj, finfine, eĉ la homoj. Apenaŭ necesas aldoni, ke ilia insisto pri racia aliro al la demando pri internacia helplingvo enkondukis en la sakstraton de perfekteco: ili ne povis ripozi ĝis ili trovos la plej perfektan formon por tiu lingvo. Ilia interesiĝo pri la reformita Esperanto, kiun oni nomis Ido, estis nur komenco de procedo, en kiu lingvaj detaloj fariĝis pli gravaj ol la grandaj politikaj katastrofoj de la 1910-aj jaroj. La sekvantoj de Zamenhof, aliflanke, preferis lingvan konservativon por povi fronti aliajn demandojn.

Zamenhof estis iom malentuziasma pri publika apero en Bulonjo (Boulton 101). Jam de la komenco de la Esperanto-movado li emfazadis sian deziron krei aŭtentikan lingvo-komunumon, en kiu lia personeco ne ludu tro gravan rolon. Lia genio konsistis ĉefe en tio, ke li komprenis, ke lingvo sen pasinteco, sen ia historio, ne povas funkcii kiel lingvo. Komenci lingvon estas en si mem paradoksa paŝo, ĉar ĉiu lingvo vivas el la fakto, ke homoj jam parolas ĝin, jam uzas ĝin, jam havas je sia dispono semantikan sistemon, kiu entute donas al la vortoj sian, kaj sekve ilian, signifon. La sola maniero krei novan lingvon estas doni la impreson, ke ĝi iasence jam ekzistas. Pro tio, jam en la komenco, Zamenhof emfazis ne la diferencojn inter sia nova lingvo kaj la aliaj ĉirkaŭaj lingvoj, sed ĉefe la similecojn. La nova lingvo ekestu ne el ovo (kiel dirus la latinistoj) sed el birdo jam fluganta per flugiloj de facila vento. “Mi tre petas Vin,” li skribis al Michaux, “akceptu en la programon de la kongreso nenian punkton, kiu havas ian rilaton al mia *persono*. Mi tre volas, ke la kongresanoj vidu en mi ne la aŭtoron de Esperanto, sed nur *simplan esperantiston*.... La *aŭtoro* de Esperanto en la kongreso devas esti rigardata kiel mortinta kaj neekzistanta; por la kongreso devas ekzisti nur la *afero*.... Ĉio tio ĉi ne estas ‘modesteco’ de mia flanko – ĝi estas ‘neceseco.’ Nia afero prosperados nur en tia okazo, se ĝi estos ĉiam *absolute senpersona*” (Boulton 101).

En tiu kunteksto, la sinteno de Zamenhof en Bulonjo estas aparte interesa.³ Kiam li alparolis la Unuan Universalan Kongreson de Esperanto, lia parolado relative malmulte emfazis la praktikan aspekton de la nova movado. Li emfazis ĉefe la unikecon de la okazo: la homoj inter si reciproke interkompreniĝas per lingvo kreita sur fundamento neŭtrala, lingvo akirebla relative facile, lingvo, kiu definitive finas la reciprokajn “surdmutecon” inter la popoloj. Li diris, ke la kunveno estas samtempe modesta kaj epokfara. Li retrorigardis al la pasinteco de la nova movado, laŭdante (eĉ se iom retrobate) la laboron de sia antaŭulo Schleyer, kreinto de Volapuko, kaj la pioniran spiriton de la fruaj esperantistoj, multaj el kiuj intertempe forpasis. Malgraŭ la aludoj al la facileco de la lingvo, Zamenhof malmulte parolis pri la praktika utiligo de la lingvo, emfazante ĉefe la miraklon de ĝia ekzisto. Li dankis al la gastiganta lando kaj al tiuj

³ Vidu la prezenton en Boulton 105-113, kiun mi utiligis kiel mian ĉefan fonton.

eminentuloj, kiuj montris apogon al la ideo de Esperanto. La ĉeestantoj ja ne sciis, ke, en Parizo, kelkajn tagojn pli frue, pluraj parizaj gvidantoj de la Esperanto-movado kolektiĝis ĉe la hejmo de Théophile Cart kaj trarigardis la proponatan tekston de la parolado de Zamenhof. Ili senesperigiĝis pro ĝia religieca retoriko, kaj pro la “Preĝo sub la Verda Standardo,” kiun Zamenhof proponis deklami je ĝia fino. Sed Zamenhof restis firma. Li konsentis ne laŭtleĝi la finan strofon, kun ties aludo al religia interkompreniĝo (se tiam pro antisemitismo oni ne rajtis aludi al kristanoj kaj judoj kiel samaj filoj de Dio, hodiaŭ similaj neeldiritaj bariloj malhelpas aludojn al islamanoj – ĉu entute progreso?), sed pri ĉio alia li restis firma – kaj la rezulto estis tondra aplaŭdo kaj granda entuziasmo inter la aŭskultantoj.

La parolado, kvankam ĝi ja aludis al konkretaj faktoj, havis du aŭ tri pli vastajn celojn. Unue, ĝi evidente celis krei inter la ĉeestantoj (kaj tiuj, kiuj poste legos la tekston en la Esperanto-gazetaro) senton de solidareco. Verŝajne neniam antaŭe oni alparolis per rektaj Esperanto-vortoj tiel grandan aron da esperantistoj. Krome, tio okazis ne en kunveno kvazaŭ izolita for de la ĉirkaŭaĵo, sed en la kunteksto de Esperantoparolanta kongreso. Temis do pri kvazaŭ epokfara alpaŝo al kreo de aŭtentika parolkomunumo (demando, al kiu mi revenos). Esperanto ja rapide transiradis al parolateco, kaj la aranĝo en Bulonjo estis kvazaŭ kulmino de la ekesto de Esperanto-parolkomunumo. La parolado de Zamenhof celis rekonigi tiun fakton al la ĉeestantoj.

Due, kaj spite al la pli praktika aliro de la francoj, la parolado esprimis bazan ideologion de la esperantistoj – ideologion, kiun Zamenhof jam en antaŭaj verkoj komencis muldi. Zamenhof bridis sin (tio estas evidenta se oni komparas tiun ĉi paroladon kun aliaj eldiroj de la sama periodo), sed li ne forlasis sian bazan idearon pri Esperanto kiel ŝlosilo al harmoniaj rilatoj inter la homoj, kaj pri la esperantistoj kiel la portantoj de la standardo de tiuj rilatoj. Trie (kaj en la nuna kunteksto, kiam mi parolas pri la demando de kontinueco, tio aparte gravas), Zamenhof, rigardante al esperata glora estonteco, tamen ankaŭ ĵetis firman rigardon al la historio: la parolado estis kvazaŭ simbola aserto, ke Esperanto konsistigas ne ian novan eksperimenton sed jam ekzistantan ekspansiantan movadon. Ĉi-lasto fakte igis lin emfazi la facilecon de komunikado en la renkontiĝo en Bulonjo, kontraste supozeble al aliaj internaciaj renkontiĝoj. La mitaro de Esperanto kiel universala solvanto de misiroj inter la popoloj ricevis novan impulson.

Sed oni devas demandi sin kiom da homoj inter la ĉeestantoj fakte nur malforte komprenis Zamenhof, ne pro la ideoj sed pro la lingvo. Por multaj el ili temis pri nova lingva sperto – aŭskulti kaj paroli en Esperanto (Harry Holmes notas en sia historio de la Londona Esperanto-Klubo, ke en januaro s-ino Šefer, granda aktivulo en la klubo “mem vizitis Bulonjon por certigi al si ke la londona elparolo estas komprenebla al la francoj;” ŝi revenis – feliĉe – kun pozitiva raporto⁴). Zamenhof iasence kontraŭdiris sin mem, emfazante, ke ĉiu partoprenanto povas bone interkompreniĝi, kaj samtempe, ke iuj komencantoj-kongresanoj ankoraŭ nur balbutas la lingvon.

⁴ Harry Holmes, *Londono vokas: Historieto de la Londona Esperanto-Klubo* (London: Londona Esperanto-Klubo, 1979?), 13.

Tiu disfendo inter la ideologio de esperantismo unuflanke kaj la realoj de esperantisteco aliflanke ĉiam hantis kaj hantas la Universalajn Kongresojn, se ne la tutan Esperanto-movadon. La UK estas evidente la ĉefa dumjara montrofenestro de la varo, kiu nomiĝas Esperanto. Pli precize, ĝi konsistigas laŭokazan parolkomunumon, kiu ekestas ĉiujare el kombino de ripetaj kongresanoj (ekzistas pli-malpli stabila kerno de aktivuloj, kiuj celas ĉiujare veni al la kongresoj) kaj novuloj aŭ okazaj partoprenantoj. Tiuj ripetantoj ne estas nepre la plej bonaj uzantoj de la parola lingvo en la mondo, sed ili certe estas inter la plej bonaj: ekzistas aliaj ĉiam pli abundaj manieroj akiri parolan sperton, sed la Universalaj Kongresoj restas inter la ĉefaj. Samtempe, tamen, la Universalaj Kongresoj allogas ankaŭ siajn komencantojn, siajn novajn adeptojn. En pasinteco, la deziro rezervi la kongreson ĉefe por kompetenta elito – kaj tiel prezenti bonan publikan bildon – malhelpis, ke la organizantoj planu adekvate la partoprenon de komencantoj, fakte eĉ klopodu allogi ilin al la kongreso por tie doni al ili okazon sperti la parolan lingvon. Tio estas nur unu ekzemplo de la problemo kongruigi la kongresojn al la bezonoj.

Mi volas fini hodiaŭ per ses iom fundamentaj demandoj, kiujn levas tiu ĉi mallonga promenado tra la pasinteco de niaj kongresoj.

- 1. Unue pri la lingvo. Ĉu ni povas hodiaŭ efektive difini normojn de parola Esperanto aliajn ol tiuj de la skriba Esperanto? Ĝis kiu grado la Universalaj Kongresoj kreis tiujn normojn?**
- 2. Ĉu ni plene ekspluatas la kongresojn por evoluigi la parolan lingvon?**
- 3. Kaj pri la eŭropeco. Ĉu la bazo de la kongresoj estas esenca eŭropa? Ĉu niaj kongresoj respegulas okcidentan mondkoncepton?**
- 4. Kaj eliteco. Ĉu oni povas nomi la kongresojn reprezentaj, aŭ ĉu ili estas por socia elito? Ĉu tio gravas?**
- 5. Kion fari por altigi la lingvan nivelon de la Universalaj Kongresoj kaj ebligi la plenan partoprenon de ĉiu kongresano?**
- 6. Kaj, por kvazaŭ prezenti la malan vidpunkton.... Kiel utiligi la kongresojn ankaŭ por lernejoj de la lingvo, do por komencantoj?**

2. La estonteco de la Esperanto-komunumo

Tra la cent jaroj de la ekzisto de Universalaj Kongresoj, la rolo de la kongresoj, kvankam diversmaniere ligita al la organizita Esperanto-movado, ne multe ŝanĝiĝis, kvankam profunde ŝanĝiĝis en tiu periodo la norma formo de internaciaj konferencoj. Kvankam hodiaŭ UEA havas sian Konstantan Kongresan Sekretarion, kiu ofte estas persono veninta el la medio de turismo kaj kongresorganizado (la iama KKS Gian Carlo Figliera, ekzemple, poste fariĝis grava funkciulo de la Monda Organizaĵo pri Turismo; kaj la nuna, Clay Megalhães, havas diplomon pri turismo), la esperantistoj ne facile alkitimiĝas al grandaj ŝanĝoj – aŭ, pli precize, tiuj, kiuj plej ofte ĉeestas la kongresojn kaj plej multe laboras por organizi ilin, emas ne entuziasmi pri ŝanĝoj en la ŝablono. Kelkaj kongresoj elstaras kiel lokoj de iom signifaj ŝanĝoj – ekzemple la enkonduko de disdivido inter matena eksterendirektita Inaŭguro kaj posttagmeza internendirektita Malfermo en Kopenhago en 1975, aŭ la trakto de la kongresa temo en Stokholmo en 1980, pere de malgrandaj diskutgrupoj.

Tamen, ambaŭ tiuj ŝanĝoj estas ankaŭ ekzemploj de la esenca konservemo de la kongresaj organizantoj. La pritrakto de la kongresa temo en Stokholmo, kiu celis engaĝi la simplajn kongresanojn, estas unuavide nepre plibonigo super tio, ke la ordinaraj kongresanoj aŭskultu prelegojn kaj paroladojn kaj je la fino nur levi aprobe siajn manojn, sed en postaj jaroj oni rapide forgesis pri tiu nova enkondukaĵo, kaj post kelkaj jaroj denove la pritrakto de la kongresa temo fariĝis pasiva kaj desupra. Nur en Zagrebo en 2001 la Stokholma modo estis revivigita, kaj ĝi daŭras ĝis la hodiaŭa tago.

La disdivido de la Inaŭguro kaj Malfermo ebligis akcepton de diplomatoj en la matena Inaŭguro, kaj eventuale inviton de grava eksterstaranto kiel ĉefparolanto (kiel okazos ekzemple en Rejkjaviko en 1977), dum la pli “verdaj” aranĝoj, ekzemple la salutoj de landaj reprezentantoj kaj la parolado de la prezidanto de UEA, estis rezervitaj al la posttagmezo, kie do oni povis komenci enprofundiĝi en la laboron de la kongreso. Tiu aranĝo daŭris nur ĝis 1985 kaj ne estis revivigita. Rezulte, la inaŭguroj reiris al sia malnova ŝablono, kiu nek donas aparte bonan bildon de la kongreso ekstere nek entuziasmigas kaj konsciigas la kongresanojn pri la kongresaj laboroj.

Tiu konservemo havas du, eventuale tri, ĉefajn kaŭzojn. Unue, kiam landa aŭ loka Esperanto organizaĵo venas al la ideo inviti kongreson al sia lando, ĝi laboras per la jam ekzistanta programo kaj ne konsideras la eblecon proponi ion novan (kiun la estraro de la Asocio, la decida organo pri invitoj, ne aparte invitas). Due, la Centra Oficejo de UEA, kie laboras la Konstanta Kongresa Sekretario kaj kies oficistoj estas intime ligitaj al la kongresaj laboroj, estas kutime tiel okupata pri aliaj aferoj, ke ne ekzistas ĉe ĝi iu aparta emo aŭ motivigo por fari novajn elpaŝojn. Nur malofte okazas eĉ minimumaj klopodoj esplori novajn formojn aŭ enketi ĉe la publiko pri novaj aliroj. Trie (kvankam malpli evidente), la regulaj kongresanoj ŝatas trovi la kutimajn kongresajn erojn en ĉiu kongreso.

Ĉi-lasta punkto karakterizas la fenomenon mem. Kiel ĉiujara dum unu semajno reformiĝanta mikrosocio, la kongresoj ja emas al ripetiĝo: la roluloj en tiu socio rekreas ĝian etoson je ĉiu manifestiĝo, kvazaŭ reprenante ĉiujare la fadenojn de la antaŭa jaro. Tiu artefarita kontinueco verŝajne helpas al la ensociiĝa procedo: homoj, kiuj ofte vizitas kongresojn, lernas kiel kondukti en ili, kiel atingi siajn celojn, kiel religi la kontaktojn. Sed tiu fakto en si mem havas du grandajn malavantaĝojn. Unue, la fakto, ke la regulaj vizitantoj tiel facile reeniras ĉiujare la kongresan etoson, igas la normojn de tiu etoso samtempe komplikaj kaj netravedeblaj flanke de tiuj, kiuj nove venas en la medion. Temas pri ankoraŭ unu aspekto de la esenca fermiteco de la Esperanto-socio – fermita en sian propran rondon de sia aparta lingvo, siaj atendoj de la anoj, sia ideologio.

Due, le ideologio de la esperantistoj – kiu interalie supozigas, ke per uzo de la sama lingvo kaj ensorbo de ĝiaj valoroj, ĉiuj obstakloj al la interkompreniĝo malaperos – altigas la atendojn ĝis nerealisma nivelo. Esperantistoj venantaj el, ni diru, kvardeko da landoj, alportas kun si kvardek metodojn organizi kunsidojn (verŝajne pli...), kvardek sistemojn por atingi interkonsentojn, kvardek regularojn pri konversacioj kaj debatoj, por ne paroli pri subtilaj semantikaj diferencoj, manko de unueco pri la metalingvaj aspektoj de Esperanto (gestoj, konversacia distanco, reguloj pri trakto de difinitaj temoj. Sub tiuj cirkonstancoj, la fakto, ke oni sukcesas ion ajn atingi estas en si mem granda atesto pri la efikeco kaj de Esperanto kaj de la esperantistoj. Retrovi ĉiujare la normojn de dumkongresa intertrakto estas malfacile eĉ por la regulaj vizitantoj; por la aliaj ĝi estas profunde malfacila.

Mi ne dubas, ke multaj el la disputoj kaj kvereloj, kiuj ĉiam markis nian movadon, fontas el tio, ke la kulturaj atendoj de la homoj estas diversaj, kaj ke la establitaj kondutonormoj estas malfacile paŭseblaj de la partoprenantoj.⁵ Kaj en movado en kiu la ĉefa organiza laboro, aŭ almenaŭ la ĉefaj organizaj decidoj, estas farataj en unu semajno unu fojon jare, malsukceso de la kongresaj intertraktoj povas esti katastrofa.

Tiujn demandojn oni malmulte studas. Oni supozus, ke la haloj de la kongresejoj plenplenus je lingvistoj esplorantaj la efikon de kulturaj diferencoj en medio, kiu ideologie celas al kultura kaj lingva neŭtraleco, aŭ studantaj la uzon de gestoj inter esperantistoj, aŭ ekzamenantaj la rolon de intonacio en parolata Esperanto – sed ne. La lingvaj kaj socilingvaj aspektoj de niaj kongresoj (kaj de la Esperanto-socio ĝenerale) restas malmulte studataj. Ekzistas pluraj kialoj por tio, el kiuj nur unu estas tio, ke la esperantistoj ne tre ŝatas esti memorigataj, ke tiuj diferencoj ekzistas, kaj ke ili ne aŭtomate foriras se oni parolas saman lingvon.

Oni ankaŭ supozus, ke, se nur unu fojon en la jaro kolektiĝas sufiĉe granda grupo da homoj por povi entute nomi tiun kolektiĝon aparta socio, oni pli profunde okupiĝus pri la demando, kiel antaŭenigi kaj disvastigi la valorojn de nia komuna kulturo en ĉiuj ĝiaj aspektoj. Mi pensas ĉi tie pri teatraj prezentoj, prezentoj de grandaj Esperanto-aŭtoroj, pritrakto de la historio de la Esperanto-movado, kaj similaj kulturaj agadoj. Sed ofte tiuj aranĝoj, se ili okazas entute, okazas ne pro sia centreco en nia pensado pri la kongresoj

⁵ Povus esti, ke tiu problemo kontribuis al la grandaj disputoj de la fruaj kongresaj jaroj, kaj la skismo de Ido, kiu sekvis.

sed pro tio, ke oni devas tamen prezenti ion por amuzi kaj interesi la kongresanojn. Granda manko en la hodiaŭaj kongresoj estas la fakto, ke ili nur supraĵe traktas la Esperanto-kulturon en ties tuto.

En sia libro *La ordo de aferoj* (1970),⁶ Michel Foucault enkondukis la nocion de “epistemoj” – domina maniero koncepti socian realon per komunaj simboloj kaj aludoj, komunaj antaŭvidoj, kaj reciproka antaŭvideblo de intencoj. Epistemaj komunumoj estas komunumoj de homoj, kiuj dividas inter si difinitan manieron koncepti la socian realecon. En tiu senco, la Esperanto-movado mem konsistigas tian komunumon – kaj ene de ĝi la Universalaj Kongresoj okupas apartan lokon. Tiuj regule okazantaj kunfluo de homoj profunde influas la kreon de komunaj normoj en la epistema komunumo, kiu nomiĝas la Esperanto-movado aŭ Esperantujo. Ni nesufiĉe komprenas tiun fakton, nek uzas ĝin kiel deirpunkton por difini la celojn kaj aktivecojn de niaj kongresoj. Jam de la komenco, la Universalaj Kongresoj rolas kiel nervocentroj de la internacia Esperanto-agado. Hodiaŭ, en nia konektita epoko, la formo de tiu nervocentro devus adaptiĝi al ŝanĝiĝantaj organizaj normoj, al elektronika konektiteco, kaj al la bezonoj de movado, kiu laboras por la disvastigo de grava kaj fundamenta ideo ekster la propra medio.

La kongresoj restas unu el la plej signifaj elementoj en la kreo de esperantista solidareco, en la konfirmado kaj reaserto de la esperantista ideologio, kaj en la rekonfirmo de kultura identeco de la esperantistoj. Ili ankaŭ daŭre ludas rolon en la normigo de la parolata lingvo. Apenaŭ necesas aldoni, ke ili estas grava laborejo de la esperantistoj, en kiu okazas signifaj kunvenoj kaj en kiu oni faras gravajn decidojn. Por multaj homoj ili estas kvazaŭ konstanta komunumo, muntata kaj malmuntata ĉiujare, sed esence konsistigante portempan kaj ripetiĝantan mikrosocion.

La spirito de solidareco kaj la sento, ke oni vivas en mikrosocio, kombiniĝas kun la lingvo mem por krei iom fortan senton de aparteco for de la ĉirkaŭa socio en la lando, kie okazas la kongreso. Laŭ la nun valida kongresa regularo la UK estas “internacia manifestacio de la parolantoj de Esperanto.” Ĝi havas (almenaŭ laŭ tiu regularo) tri celojn: krei solidarecon, progresigi la movadon, kaj studi ĝiajn problemojn. La ekstera aspekto de la UK, i.a. la engaĝiĝo kun la gastiganta lando, restas nesufiĉe ekspluatata en la realo kaj nesufiĉe esprimita en la celaro.⁷ Ankaŭ malmulte ekspluatata estas la potenciala rolo de la UK kiel loko de edukado kaj klerigo pri la lingvo kaj kulturo de Esperanto. La UK estas daŭre bezonata fenomeno, sed ĝi devas adaptiĝi al la ŝanĝiĝantaj bezonoj de la Esperanto-movado kaj la teknikaj eblecoj. Hodiaŭ, kiel mi menciis, ĝi povus fariĝi ne nur ĉeesta sed ankaŭ virtuala ligilo inter la anoj de la Esperanto-parolkomunumo. Zamenhof en 1905 deklaris, ke la vortoj parolataj en la kongreso “ne flugos telegrafe al ĉiuj urboj kaj urbetoj de la mondo.” Hodiaŭ tio tamen eblus, kvankam aliforme – kaj la loĝantoj de tiuj urboj kaj urbetoj povus mem partopreni en vera

⁶ *The Order of Things* (New York: Random House, 1970); *L'ordre des choses* (Paris: Gallimard, 1971). Pri la koncepto de epistemaj komunumoj, vidu la eseon de John Gerard Ruggie (1975) reviziita kaj re-prezentita en lia *Constructing the World Polity* (London and New York: Routledge, 1998).

⁷ Tamen tiun demandon oni serioze pripensis en Bulonjo en 1905. Ekzemple, oni povas legi en la julia *The Esperantist* de 1905 (pĝ. 105) ke la kongresaj balo kaj koncerto estu tiel organizitaj, ke “ni estos incitintaj la kuriozecon de la skeptikuloj kaj de la indiferentuloj kiuj nepre estos tiam esperantistigotaj.”

reciprokeco. Ĉu estontaj kongresoj fariĝos aŭtentika manifestacio de la parolantoj de Esperanto, grandparte sendepende de ilia loĝloko kaj iliaj personaj cirkonstancoj? Tio povus konduki al ia demokratiĝo de la kongresoj, kaj al novaj formoj de kunlaboro. La kongresanoj de Bulonjo de 1905, se ili povus reveni al niaj kongresoj hodiaŭ, alportus al ni tiun senton de fervoro kaj optimismo, kiun Zamenhof trovis kaj tiel elokvente plifortigis, sed ili eĉ tro facile rekonus en la nunaj kongresoj pli banalajn elementojn el la unua. Nova epoko bezonas novajn agadmanierojn.

Mi finis mian unuan paroladon per ses kernaj demandoj. Nun mi aldonu ses pliajn demandojn, kiuj fontas el mia pritrakto de la hodiaŭa situacio de niaj kongresoj....

- 1. La Universalaj Kongresoj nur malrapide ŝanĝiĝas. Kion fari por faciligi kaj instigi eksperimentadon per novaj formoj kaj agadoj dumkongresaj?**
- 2. Ĉu la Esperanto-movado estas kulturo kaj do devas regule re-vivi siajn kulturajn normojn? Se jes, kiel ekvilibrigi tiun neceson kun la neceso adaptiĝi al ŝanĝiĝantaj kondiĉoj?**
- 3. Kiel pli bone organizi nin por eviti miskomprenojn linvaj kaj kulturajn kaj maksimumigi dumkongresan kunlaboron?**
- 4. Universalaj Kongresoj prezentas unikan ŝancon por prezentado kaj evoluigo de nia kulturo. Kiel igi ilin pli fortaj kulturaj manifestacioj?**
- 5. La elektronika epoko jam venis. Kiel uzi tiujn novajn rimedojn por transformi la Universalajn Kongresojn en tutmondajn renkontejoj realajn kaj virtualajn, kun plena partopreno el la tuta mondo kaj ĉiuj sociaj tavoloj?**
- 6. Se tiu renovigo kaj refaro necesas ĉe la Universalaj Kongresoj, eble ĝi necesas ĉe la movado kiel tuto. Kion fari por renovigi kaj refari niajn organizajn strukturojn?**